

# Boletín

**Federación Española de Esperanto**  
**Asociación de Utilidad Pública**



**N-ro 328 • Novbro - Decbro 1996**

# Boletín

BULTENO DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO  
Aperanta de 1949

## Ĉefredaktoro

Antonio Marco Botella  
Av. Compromiso de Caspe 27-29, 9<sup>o</sup> C  
ES-50002 Zaragoza

## Redaktoroj kaj kunlaborantoj

Salvador Gumá Clavell  
Miguel Fernández Martín  
Vicente Hernández Llusera  
Andres Martín González  
Luis Serrano Pérez  
Miguel Gutiérrez Adúriz  
Antonio Valén Fernández

## Hispana Esperanto-Federacio

Rodríguez San Pedro 13-3<sup>o</sup>-7  
Es-28015 Madrid  
Tel. +faksilo: +34-(9)1-446-80-79  
esperanto@canaldinamic.es

## Estraro

Prezidanto: Antonio Alonso Núñez  
Vicprezidanto: José M. Galofré Domingo  
Sekretario: Manuel Parra Benito  
Vicsekretario: Marcos Cruz Martín  
Kasisto: José M. Bernabeu Franco  
(konto: 14.011.966, Caja Postal)  
Voĉdonantoj:  
Luis Hernández García  
Antonio Marco Botella  
Juan Antonio Cabezos  
Augusto Casquero de la Cruz  
Miguel Gutiérrez Adúriz

*Kovrilo:* Ada Fighiera-Sirkorska

*Nota:* Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

## Enhavo

Estrarkunveno	2
81a UK	6
Manifesto de Prago	8
Nitobe-simpozio de internaciaj organizoj	10
Nekrologoj	12
Viglas la movado	13
Diri vian nomon, Ada Fighiera-Sirkorska ( <i>Miguel Fernández</i> )	19
Ada ( <i>Jorge Camacho</i> )	21
Forpasis Ada ( <i>Juan Carlos Ruiz</i> )	22
Ibn Hamdis, elstara sicilia poeto (Antonio Marco Botella)	23
Omáge al Amalia Nuñez Dubus (3) ( <i>A.M.B.</i> )	27
La verda Donkiĥoto (R) (Antonio Marco Botella)	28
Jam la kvara! (Luis Serrano Pérez)	30
Jarabonoj kaj kotizoj por 1997	31
HEF-anigilo	32

En Madrido, en la Centra Oficejo de HEF, la 14an de septembro de 1996, je la 10a horo, kunsidis la estraro de HEF, kun la ĉeesto de jenaj estraranoj: Antonio Alonso, prezidanto; José Mú Bernabeu, kasisto; Manuel Parra, sekretario; Marcos Cruz, vicsekretario; Augusto Casquero, direktoro; Antonio Marco, Luis Hernández kaj Miguel Gutierrez, voĉdonantoj. Krome ĉeestis la kunlaborantoj en la C.O.: Maritza Graciani, Rafaela Urueña, Miguel Angel Sancho Parado kaj Héctor Barca. Jen la temaro:

## 1.— HEF-kongreso en Murcia

La partopreno estis malalta. Pluraj estas, niaopinie, la kaŭzoj de la malalta partopreno de kongresanoj en la menciita kongreso, la plej gravaj, eble, la bedaŭrinda kalendara koincido de la Universala Kongreso kaj karavano veturinta al Prago. Ankaŭ oni taksis nesufiĉa la informadon pri la kongreso dum la monatoj antaŭaj al ĝia okazigo. Cetere, oni konstatas, ke dum lastaj jaroj la partopreno daŭre malaltiĝas, ke niaj kongresoj perdas allogon. Estonte oni devos zorgi pri tiaj bedaŭrindaj koincidoj.

En 1997a, nia kongreso okazos en Valencio, kadre de pli ampleksa programo, do ne estas probabla ripetigo de tiuj kaŭzoj, sed por eventuala ripetigo en 1988a, samideano Casquero sugestas ke

la tutlanda kongreso prefere okazu dum pasko, kaj en iu ajn urbo sufiĉe alloga por altiri pli da kongresanoj, ĉar ne nepre oni devas organizi kongresojn fare de loka esperantista grupo. Li, kiel direktoro kaj organizanto de kongresoj, baldaŭ komencos serĉi adekvatan urbon.

Alia decido de la asembleo estis malfaltiĝi laŭeble la kotizon de la junuloj. Obeante tiun decidon, kaj malgraŭ la malkonsento de s-anoj Alonso, Marcos Cruz, Parra k.a., Marcos Cruz proponis solvon konsistantan rabati la membrokotizon je 10 centonoj al tiuj membroj kiuj posedas validan junulkarton, liveritan de autonomaj registaroj. Ĉiuj junuloj ricevos la revuon *Kontakto*, regulajn informilojn kaj ekde 1997 ankaŭ la porjunularan bultenon *Koncize*.

Tuj oni debatis la decidon de la Murcia Asembleo pri perpoŝta konsulto al la membroj ne partoprenantaj en ĝeneralaj kunsidoj, kiam la aferoj deciditaj estas sufiĉe gravaj. Evidentas ke tiu decido estas kontraŭstatuta, kiel klare indikas la artikoloj de la 12a ĝis la 17a. La sekretario, do, informos la proponinton, nome, Kultura Asocio Esperantista ke en la kazo ke ĝi intencu persisti en tiu propono, oni devus unue kunvoki Eksterordinaran Kunvenon de la anaro, ŝanĝi la enhavon de la indikitaj artikoloj, kaj se akceptita de la plejmulto, proponi tiajn ŝanĝojn al la Ministerio pri Internaj Aferoj, kiu decidus pri tiu afero.

## 2.— «Ludovikito»:

Antaŭ ne longa tempo viglis kampanjo por financi la aĉeton de la kolosa kolekto da verkoj de la eldonisto "Ludovikito". La Estraro decidis relanĉi tiun kampanjon per artikoloj de prezidanto Alonso en *Boletín*.

## 3.— HEF-Biblioteko.

Rilate al la Biblioteko kiu troviĝas en la C.O. ampleksanta nun ĉirkaŭ mil volumojn, oni decidis:

a) Nomi ĝin Biblioteko "Juan Régulo Pérez".

b) Kovri la jam instalitan bretaron per kvazaŭ-ŝranko, kies buĝeto sumas 175.000 ESP.

c) kompletigi ĝin per la kolektado de ĉiuj jurnalaj artikoloj aperintaj en nia lando pri Esperanto, kaj per "foto-banko".

d) Miguel Gutiérrez Adúriz esploras la eblon por eventuala aliĝo de nia Biblioteko al tutlanda biblioteka reto nomata REBECA.

## 4.— Nacilingvaj informiloj

HEF eldonos komence de la venonta jaro, informan broŝuron, verkatan de Antonio Alonso, kies strukturon kaj enhavon li prezentis al la estraro.

La prezidanto Alonso reesprimis sian bedaŭron, ke dum lastaj jaroj ni ne plenumis nian deziron informi la eksteran publikon pri Esperanto per nia revuo. Samideano Marco memorigis al la ĉeestantoj, ke antaŭ kelkaj jaroj (ĝuste en *Boletín-307*) oni metis hispanlingvajn

paĝojn en nia bulteno. Tio estis motivo de pluraj protestoj de HEF-membroj, precipe de katalunoj. Do por komplezi ĉiujn membrojn oni devus pretigi ĉu kvinlingvan bultenon aŭ daŭrigi kiel ĝis nun nur en Esperanto. Sendube tre malfacila solvebla afero.

Kiel solvo al la problemo pri propagando, prezidanto Alonso proponas aperigi eksterordinaran numeron, po unu en ĉiu jaro, tute en la hispana lingvo, anstataŭ kelkaj paĝoj en ĉiu numero kiel oni proponis kaj faris antaŭe.

Miguel Gutiérrez kaj Marcos Cruz informas, ke post du monatoj ni havos en la komputila reto, INTERNET, plurnacilingvan informilon, danke al la kunlaboro de Miguel Angel Sancho. Ĉi tiu samideano montris al la estraro la enhavon de provo kaj klarigis kiel uzi ĝin.



Oni decidis, ke post la starigo de la retaj paĝoj, ni eltiros el ili nacilingvajn informojn por eventuala aperigo en *Boletín*. Ni petos al s-anoj Alonso pri galega, al Gauna pri eŭska kaj al aliaj kunlaborantoj pri valencia kaj kataluna lingvoj, kaj tiel kontribui per tiuj informoj al la paĝaro de nia projekto.

Rilate al la retaj paĝoj, oni decidis peti al nia murcia samideano Jesus de las

Heras ne plu uzi la nomon de HEF en siaj privataj paĝoj, kaj ankaŭ peti la samon al nia estrarano Juan Antonio Cabezas en la revuo «El Correo del Esperanto».

Rilate al la propono de s-ano José Pina Tuels en la asembleo de Murcia por ke *Boletín* transformiĝu en la sola bulteno de ĉiuj lokaj kaj regionaj grupoj, eĉ agnoskante ke tio signifus ŝparon da mono, sed ne estis akceptita de la reprezentantoj de E-grupoj kun bulteno tie ĉeestantaj. Ne estas la unua fojo ke tiu propono estis debata en asembleo kaj neniam akceptita, pro diversaj kaŭzoj ja ĉiu grupo preferas sian propran flugfolion aŭ bultenon.

### 5.— Emblemo

La estraro decidis ke la Asocio havu propran distingnan simbolon. Tiucele ni jam ricevis plurajn provojn antaŭ nelonge petitajn al du profesiaj desegnistoj. Post elekto de unu el ili, oni aldonos al tiu kolorajn variantojn por veni al kiel eble plej trafa prezento-bildo de nia Federacio.

### 6.— Perkoresponda kurso

Kvankam jam de pluraj jaroj oni oficiale akceptis starigi perkorespondan kurson, la decido ne efektiviĝis pro diversaj motivoj, inter kiuj la manko de la adekvata didakta materialo. Marcos Cruz eksponis la nunan staton de la projekto, al kiu nun mankas nur la perpoŝta ekzercaro jam preskaŭ preta. La kurso

komenciĝos, tre probable, ĉirkaŭ la fino de 1996.

### 7.— Eksigoj

Kun bedaŭro ni informas pri la eksigo de pluraj el niaj membroj pro plurjara nepago de la kotizoj, inter ili dek abonantojn de *Boletín* kaj naŭ ordinarajn membrojn.

### 8.— Eŭropa Esperanta Unio

Post peto de Eŭropa E-Unio al HEF sendi reprezentanton, ni decidis elekti nian samideanon Luis Hernández por reprezenti nian Federacion en la venonta Eŭropa Kongreso okazonta en Stutgart-1996. Luis Hernández ricevos la pagon de sia vojaĝokosto.

### 9.— Pri KEA

En prevento de eventualaj malagrablaj surprizoj, la prezidanto Alonso formale sin turnos al UEA petante ke se iam KEA restarigos sian peton fariĝi landa asocio de UEA, ĝi tuj informu nin oficiale sufiĉe antaŭtempe.

### 10.— Vojaĝkostoj

Konsiderante la altan vojaĝkostojn pagatajn de la estraranoj okaze de oficialaj kunsidoj en Madrido, la HEF-estraro decidis pagi parton de la kosto de la vojaĝo al tiuj estraranoj kiuj tion petos de la sekretario. Tiel ĉiu estrarano povos



ricevi 10 pesetojn por ĉiu kilometro da vojaĝo farita de sia kutima loĝloko al la CO.

### 11.— Honoraj Membroj

La HEF-estraro decidis ke, ĉar Fernando de Diego estas la sola el niaj Honoraj Membroj ankoraŭ ne formale omaĝitaj, oni petas al la Direktoro de HEF, s-ano Casquero, aranĝi omaĝon al li kadre de la venontjara kongreso en Valencio.

### 12.— Cirkulero al la veteranoj

La HEF-estraro decidis sendi leteron al ĉiu veterano de nia Federacio instigante ilin iamaniere helpi per mondonacoj nian **Fundación Esperanto**. La vicsekretario Marcos Cruz poluras nun la

tekston en la pluraj lingvoj de la hispana ŝtato.

### 13.— Investoj

Oni komisiis s-ron Pedro Garrote informiĝi pri la ebloj rentumigi parton el la nuna kapitalo.

### 14.— Renovigo de la estraro

La estraro traserĉis inter la plej elstaraj membroj de nia Federacio kaj elektis ok-naŭ homojn, al kiuj ni adresos leteron kun la propono akcepti kandidatigon por okupi la prezidan HEF-postenon.

Je la dudeka horo, farinte nur tagmanĝan paŭzon, la prezidanto Alonso fermis la kunsidon, kies enhavon ni disvastigas speciale por niaj membroj.

La Redakcio.



ABONU KAJ ABONIGU  
**EL POPOLA ĈINIO**

**Abontarifo por 1997  
3.500 ptoj**

12 numeroj jare. 52 paĝoj ĉiunumere. Informoj pri la E-movado tra la mondo. E-rubrikoj. Aktualaj raportoj kaj artikoloj pri Ĉinio.

Sendu poŝtmandaton al Felix Gómez Martín  
c/ Corbeta 8 - 5-A; 28042 Madrid; tel: 91-7472378  
aŭ al via kutima peranto

La alloga kaj bela centtura urbo Prago gastigis 2971 gekongresanojn venintajn el 65 diversaj landoj por partopreni la ĉi-jaran Universalan Kongreson de Esperanto.

La diversaj programeroj okazis en la Muzikpalaco, impona kaj moderna konstruaĵo apud rivero Vultavo, kie la membroj de L.K.K. kaj amaso da helpantoj faris ĉion eblan por plenumi ĉe niajn plej etajn dezirojn kaj petojn.

En la granda koncertsalono, ricevinta la nomon D-ro Zamenhof dum la kongresaj tagoj, okazis la 21an de julio la solena inaŭguro, kun ĉeesto de la Vicurbestro de Prago, de la reprezentanto de la UNESKO s-ro Poth, kaj, kompreneble, de la tuta estraro de UEA, ĉi-jare unuafoje prezidate de la koreano s-ro Lee Chong. Oni legis salutleterojn de diversaj gravuloj, kiel tiun de s-ro Václav Havel, prezidento de la Ĉeĥa Respubliko, de s-ro Mayor Zaragoza, Ĝenerala Direktoro de la UNESKO, de s-ro Boutros Ghali, Ĝenerala Sekretario de ONU kaj aliajn de diversaj neregistraj organizoj.

Post bela muzika kaj teatra paŭzoj, estis la vico de salutoj de la reprezentantoj de la diversaj landoj, inter kiuj tiu de nia lando fare de D-rino Uruĉña, kiu emfazis du gravajn eventojn okazintajn en nia lando: la Esperanto-kursojn en la

Universitato de Valencio kaj la prezenton de la projekto pri Preuniversitataj Internaciaj Somerkursoj en la Universitato de Santiago de Compostela, ambaŭ interesaj kaj transcendantaj.

Dum la semajno okazis, kiel kutime, diversaj kaj variaj programeroj; bedaŭrinde oni ne povas partopreni ĉiujn, ĉar ofte koincidas la horo de pli ol unu, pro tio ni penos skizi tiujn kiujn ni ĉeestis:

Kiel Komitatano A, ni partoprenis nome de Hispana Esperanto-Federacio en la diversaj komitatkunsidoj en kiuj estis akceptitaj diversaj rezolucioj kaj ankaŭ la nomatan **Manifesto de Prago**, kies tekston vi povos legi sur alia paĝo.

Pro demisio de la antaŭa Ĝenerala Sekretario, s-ro Mark Fettes, estis elektita por anstataŭi lin s-inon Michela Lipari, el Italio. Vietnamana Esperanto-Asocio kaj Esperanto Federacio de Bharato (Hinda Unio) estis akceptitaj kiel novaj Landaj E-Asocioj aliĝintaj al U.E.A.

Krom mia laboro kiel komitatano, ĉi-jare mi kontaktis kun gravuloj de la Internacia Esperanto-Movado rilate al la Internaciaj Preuniversitataj Somerkursoj okazontaj en Santiago de Compostela. Ankaŭ en la kongresa kuriero titolita **Pragaj Sonoriloj** aperis raporto pri la oficiala prezento de la Somerkursoj okazintaj je la unuaj tagoj de julio. Krom la **Nitobe Simpozio**, pri kiu vi povas detale legi sur alia paĝo, ankaŭ okazis fakaj

kunsidoj, en kiuj membroj de la koncernaj fakaj asocioj kaj interesitoj pri la temo aktive partoprenis.

Dum la semajno ne mankis artaj kaj kulturaj aranĝoj, el ili mi partoprenis: la Nacian Vesperon, okazintan dimanĉe vespere, en kiu la kongresanaro, kiu plenis la salonon, ĝuis la muzikon, folkloron kaj dancon de Ĉeĥio kaj de la najbara lando Slovakio.

En lando de elstaraj muzikkomponistoj kiel Smetana kaj Dvorak, ne mankis interesaj koncertoj: ni ĉeestis koncertojn prezentitajn de diversaj muzikistoj kaj operkantistoj, en kiuj ankaŭ nia lando estis reprezentata per la komponaĵo de



Pablo Sarasate titolita "Andaluzia Romanco" ludata de la violonisto Jan Duda. Amuza kaj interesa spektaklo!

Universitataj profesoroj el diversaj landoj, inter ili la nobelpremiito pri ekonomiko prof. Selten, prelegis pri diversaj temoj kadre de I.K.U. Ni ĉeestis la tre interesan kaj instruan prelegon de magistro K. Enderby titolitan "La indiĝenaj popoloj el Aŭstralio", en kiu la prezidanto de la O.K. por la venontjara U.K. rakontis pri la vivkondiĉoj pasintaj kaj aktualaj de la aŭstraliaj aborigenoj.

En ĉiu U.K. oni aranĝas kurseton por ekkoni la lingvon de la gastiganta lando,

kaj serio da prelegoj pri diversaj temoj rilataj al la lando kaj urbo kie oni kongresas. Ĉi-jare estis organizitaj kvar prelegoj el kiuj unu el ili, pri la turismaj allogoj de Prago, kun lumbildoj; mi partoprenis kaj restis tre bone impresita.

Prezento de novaj libroj, fariĝis jam tradicia programero kadre de ĉiu Kongreso. Pro la abundo de novaj titoloj prezentataj, la aranĝo, estis dividita en du partoj: la unua estis dediĉita al la beletra literaturo, kaj en ĝi, post interveno de la akademiano Aldo de' Giorgi (Italio), kiu laŭde parolis pri la verko de Antonio Marco Botella **Lirikaj perloj de Al-Andalus**, mi klarigis kaj ampleksigis informojn pri la verko. Ankaŭ en tiu kunsido mi menciis la lastan verkon eldonitan de Miguel Fernández Martín, titolitan **El la sonoraj soloj**, jam aĉetebla ĉe la Libro-Servo de HEF.

Venontaj Universalaj Kongresoj okazos en Adelajdo (1997), Montpellier (1998) kaj Berlino (1999). Pri la du unuaj, ni ricevis eksplikojn kaj detalojn pri diversaj aspektoj de ĉiu el tiuj landoj, kiuj certe utilos por pli bona organizado de nia vojaĝo kadre de la programero titolita "Venontaj U.K. sin prezentas".

Ni partoprenis ankaŭ diversajn turismajn aranĝojn, kiel krozon tra la Ultava rivero, Folkloran Vespermanĝon, Feston en bieno proksima al Prago kaj ekskurson al la urbo Kutna Hora, kaj ni vizitis survoje la gotikan kastelon Sternberk kaj la urbon mem, kie elstaras la impona gotika katedralo Sankta Barbara kaj aliaj artaj monumentoj deklaritaj de



UNESKO *Kultura posedaĵo de la homaro.*

Belartaj konkursoj, prezentado de novaj artistoj, bona funkciado de Libro-Servo kaj aliaj tradiciaj aranĝoj ne mankis en Prago, sed kiam oni forlasas la kongresurbon, eble unu el la plej agrablaj sentoj estas la kunvivado kun geamikoj de la tuta mondo, la esperantista etoso kaj la impresoj ke ni apartenas al vera internacia komunumo.

Luis Hernández

Kiel supre indikite en la Informo pri la 81a UK okazinta ĉi-jare en Ĉekio, unu el la dokumentoj plej interesaj redaktitaj kaj akceptitaj de la Komitato de UEA por disvastigo tra la tuta mondo estis la tiel nomata:

## MANIFESTO DE PRAGO

Ni anoj de la tutmonda movado por la progresigo de Esperanto **direktas** ĉi tiun manifeston al ĉiuj registaroj, internaciaj organizoj kaj homoj de bona volo, **deklaras** nian intencon firmvole plulabori por la celoj ĉi tie esprimitaj, kaj invitas ĉiun unuopan organizaĵon kaj homon aliĝi al nia strebado.

Lanĉita en 1887 kiel projekto de helplingvo por internacia komunikado, kaj rapide evoluinta en vivoplenan, nuancorican lingvon, Esperanto jam de pli ol jarcento funkcias por kunligi homojn trans lingvaj kaj kulturaj baroj. Intertempe, la celoj de ĝiaj parolantoj ne perdis gravecon kaj aktualecon. Nek la tutmon-



*sincerajn  
bondeziraĵojn  
por  
1997*

da uzado de kelkaj naciaj lingvoj, nek progresoj en la komunikad-tekniko, nek la malkovro de novaj metodoj de lingvoinstruado verŝajne realigos jenajn principojn, kiujn ni konsideras esencaj por justa kaj efika lingva ordo.

**1. Demokratio:** Komunika sistemo, kiu tutvive privilegias iujn homojn, sed postulas de aliaj, ke ili investu jaroj da penoj por atingi malpli altan gradon de kapablo, estas fundamente maldemokratia. Kvankam, kiel ĉiu lingvo, Esperanto ne estas perfekta, ĝi ege superas ĉiun rivalon en la afero en la afero de egaleca tutmonda komunikado.

*Ni asertas ke lingva malegaleco sekvigas komunikan malegalecon je ĉiuj niveloj, inkluzive de la internacia nivelo. Ni estas movado por demokratia komunikado.*

**2. Transnacia edukado.** Ĉiu etna lingvo estas ligita al difinita kulturo kaj nacio. Ekzemple, la lerneĵano kiu studas la anglan lernas pri la kulturo, geografio kaj politiko de la anglalingvaj landoj, precipe Usono kaj Britio. La lerneĵano kiu studas Esperanton lernas pri mondo sen limoj, en kiu ĉiu lando prezentigas kiel hejmo.

*Ni asertas ke la edukado per iu ajn etna lingvo estas ligita al difinita perspektivo pri la mondo. Ni estas movado por transnacia edukado.*

**3. Pedagogia efikeco.** Nur malgranda procentaĵo el tiuj, kiuj studas fremdan lingvon, ekmastras ĝin. Plena posedo de Esperanto eblas eĉ per memstudado. Diversaj studoj raportis propedeŭtikajn efikojn en la lernado de aliaj lingvoj. Oni ankaŭ rekomendas Esperanton kiel kernan eron en kursoj por la lingva konsciiĝo de lernantoj.

*Ni asertas ke la malfacileco de la etnaj lingvoj ĉiam prezentos obstaklon por multaj lernantoj, kiuj tamen profitus el la scio de dua lingvo. Ni estas movado por efika lingvoinstruado.*

**4. Plurlingveco.** La Esperanto-komunumo estas unu el malmultaj mondskalaj lingvokomunumoj kies parolantoj estas sen escepte du aŭ plurlingvaj.

Ĉiu komunumano akceptis la taskon lerni almenaŭ unu fremdan lingvon ĝis parola grado. Multokaze tio kondukas al la scio de kaj amo al pluraj lingvoj kaj ĝenerale al pli vasta persona horizonto.

*Ni asertas ke la anoj de ĉiuj lingvoj, grandaj kaj malgrandaj, devus disponi pri reala ŝanco por alproprigi duan lingvon ĝis alta komunika nivelo. Ni estas movado por la provizo de tiu ŝanco.*

**5. Kingvaj rajtoj.** La malegala disdivido de potenco inter la lingvoj estas recepto por konstanta lingva malsekureco, aŭ rekta lingva subpremado ĉe granda parto de la monda loĝantaro. En la Esperanto-komunumo la anoj de lin-


gvoj grandaj kaj malgrandaj, oficialaj kaj neoficialaj, kunvenas sub neŭtrala tereno dank' al reciproka volo kompromisi. Tia ekvilibro inter lingvaj rajtoj kaj respondecoj liveras precedencon por evoluigi kaj pritaksi aliajn solvojn al la lingva malegaleco kaj lingvaj konfliktoj.

*Ni asertas ke la vastaj potencodiferencoj inter la lingvoj subfosas la garantiojn esprimatajn en tiom da internaciaj dokumentoj de egaleca traktado sendistinge pri la lingvo. Ni estas movado por lingvaj rajtoj.*

**6. Lingva diverseco.** La naciaj registaroj emas konsideri la grandan diversecon de lingvoj en la mondo kiel baron al komunikado kaj evoluigo. Por la Esperanto-komunumo, tamen, la lingva diverseco estas konstanta kaj nemalhavebla fonto de riĉeco. Sekve, ĉiu

lingvo, kiel ĉiu vivaĵospecio estas valora jam pro si mem kaj inda je protektado kaj subtenado.

*Ni asertas ke la politiko de komunikado kaj evoluigo, se ĝi ne estas bazita sur respekto al kaj subteno de ĉiuj lingvoj, kondamnas al formorto la plimulton de la lingvoj de la mondo. Ni estas movado por lingva diverseco.*



**7. Homa emancipiĝo.** Ĉiu lingvo liberigas kaj malliberigas siajn anojn donante al ili la povon komuniki inter si, barante la komunikadon kun aliaj. Planita kiel universala komunikilo, Esperanto estas unu el la grandaj fun-

kciantaj projektoj de la homa emancipiĝo por ebligi al ĉiu homo partopreni kiel individuo en la homara komunumo, kun firmasj radikoj ĉe sia loka kultura kaj lingva identeco, sed ne limigite de ili.

*Ni asertas ke la ekskluziva uzado de naciaj lingvoj neeviteble starigas barojn al la liberecoj de sinesprimado, komunkado kaj asociiĝo. Ni estas movado por la homa emancipiĝo.*

Universala Esperanto-Asocio

## NITOBE-SIMPOZIO

DE

## INTERNACIAJ ORGANIZOJ

*M.R. Uruëña*

Unuafoje en la historio de la Universala Kongresoj de Esperanto, okazis grava dutaga kunsido de esperantistaj fakuloj kun reprezentantoj de internaciaj organizoj uzante tri lingvoj: esperanto, franca kaj angla, kun aŭtomataj tradukiloj. Temis pri la nomata *Nitobe-Simpozio*.

Sed, kiu estis Nitobe? S-ro Nitobe, japana, estis samtempulo de Zamenhof, kaj estis la unua persono kiu subtenis Esperanton, kiel oficiala reprezentanto de internacia organizo, tio estas, nome de la Ligo de Nacioj. En la jaro 1921 li ĉeestis kiel oficiala observanto de la Ligo, ĉe la 13a Universala Kongreso de Esperanto en Prago, kaj subtenis tiun

lingvon post kortuŝita rigardo de bela amikeco inter la tieaj 2561 kongresanoj konstatinte la internan ideon. Pro la fakto, ke tiu kongreso okazis en Prago, kaj por iasence omaĝi tiun defendanton de Esperanto, la estraro de UEA kaj Oomoto Asocio, aranĝis ĉi simpozion.

La prezento de la sesioj estis en la 20a, 21a kaj 22a. Matene kaj posttagmeze okazis la prelegoj kaj diskutoj. Partoprenis en ĝi 50 fakuloj, proksimume, invititaj al la evento pro iliaj fakaj scioj. Mi estis invitita kiel profesorino pri Internacia Juro. La intervenoj estis seriozaj kaj klaraj, en la senco ke ĉiu reprezentanto de internaciaj organizoj ne venis por diri belajn vortojn pri Esperanto, sed por klarigi la lingvan politikon de sia propra asocio kaj la realajn eblecojn de Esperanto en ĝia sino.

Tiel, prelegis s-ino M. Josée de Saint Robert, Sekciestro pri Terminologio kaj teknikaj dokumentoj en la oficejo de U.N. ĉe Ĝenevo, pri "Politiko kaj praktiko ĉe Unuiĝintaj Nacioj", montrante la fakton, ke estas la ŝtatoj kaj la aktoroj de la internacia vivo, kiu gvidas la lingvan politikon de U.N., kaj Esperanto devas interesigi la aktorojn de tiu internacia mondo.

Nun okazas reformo de la Ĉarto de U.N., sed oni ne antaŭvidas ŝanĝojn en la lingva statuso.

Respondis s-ro Mark Fettes, nome de UEA, parolante pri la principoj kaj praktiko en la Esperanto-Komunumo. Sekvis diskutado kaj debato.

Aliaj gravaj intervenoj estis tiuj de s-ro Poth, reprezentanto de UNESKO, kiu prelegis pri la lingvoprogramoj de UNESKO, montrante ankaŭ la bezonon,

# 56a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

Valencia 8a ĝis 13a de julio 1997

KONSTANTA ADRESO: Grupo Esperanto de Valencia,  
Gran Vía Fernáudo el Católico, 45, 3a, ES-46009 Valencia.  
Telefono/faksilo 96-3849616.

BANKKONTO: Bancaja, calle Málaga, 37, ES-46009  
Valencia

KONTONUMERO: 2077 0069 24 3100702329.

Aliĝoj ĝis la 1a de majo kotizos 4.000 ptojn.

Postaj aliĝoj kotizos 6.000 ptojn.

Oni devas sendi la monon al la banko supre menciita, kaj samtempe aliĝilon kaj kopion de la konfirmo de la pago al la Konstanta Adreso de la LKK. Afigilo por la Kongreso aperos en la venonta numero de Boletín, tamen oni povas peti ĝin de la LKK.

Atentu ke kune kun la Hispana Kongreso okazos la 7a Internacia Esperanto-Kongreso kaj la 7a Eŭropa Esperanto Forumo. Cetere, abundos la ekskursoj kaj ĉiaspecaj festoj. Kiam la UK okazas tre malproksime en Aŭstralio,

**Jen kongreso por la tuta Eŭropo!**

ke la naciaj esperantaj asocioj interesiĝu al la respektiva nacia branĉo ĉe UNESKO, por ke dum la ĝeneralaj kunsidoj de la organizo, ili estu favoraj al Esperanto kaj pri la ebleco, ke Esperanto profitu la diversajn programojn de la propra UNESKO.

Prelegoj de s-ro Erasmus pri Esperanto, s-ino Cestac, ankaŭ de Unuiĝintaj Nacioj, s-ro Phillipson de la Universitato de Roskilde (Danio), s-ro I. Peeters de la Internacia Akademio pri Lingva Juro, s-ro Kobayashi, eksa universitata profesoro, s-ro Wynne Jones, Prezidanto de la Eŭropa Buroo por malpli uzataj lingvoj,

ktp., krom elstaraj esperantistoj, kiel d-ro Humphrey Tonkin, prof. John Wells, R. Triolle k.a. sekvis dum la dutagaj kunsidoj.

Konklude, tre interesa sperto, unika ĝis nun, por alproksimiĝo de vidpunktoj kaj komuna interkompreno inter internaciaj organizoj kaj Esperanto, kiun mi esperas daŭrigos estonte.

Raporto de s-ro Nitobe pri la bezono de lingvo internacia prezentita al la Ligo de Nacioj en la franca kaj la angla, aperis kun esperantlingva traduko okaze de ĉi tiu simpozio kaj estas aĉetebla ĉe Libro-Servo de Hispana Esperanto-Federacio.

## NEKROLOGOJ

### Forpaso de modela esperantisto.

La pasintan 5an de aŭgusto 1996 mortis 73-jara, en Barcelono, post longa malsano, s-ano Jozefo Climent Grañana, konata de preskaŭ ĉiuj hispanaj esperantistoj. Lian abnegacian dediĉon al Esperanto, al samideanaro kaj al Esperantismo konis kaj ricevis ni ĉiuj. Kie estis io farebla en tiu senco, tie ni trovis lian aktivan partoprenon. Li estis aliĝinta al pluraj E-grupoj. Efike li agadis en la Hispana Instituto de Esperanto, ekde la jaro 1961 ĝis 1975, kiam la Barcelona Internacia Foiro eldonis siajn murajn afiŝojn en Esperanto. Li ĉiam atente kunlaboris kun la eldonejo "Sopena", zorgante pri la daŭriga reeldonado de ĝia poŝvortaro LEXICON, kiam ĝi komencis elĉerpiĝi.

Krome, s-ano Climent multe zorgis pri la kursoj de nia lingvo en la menciita Hispana Instituto de Esperanto, en Barcelono. En ĉiuj propagandaj agadoj pri nia lingvo, li estis ĉiam en la unua vico. Multaj esperantistoj ricevis lian helpon, ne nur dum ilia okaza vizito tra la urbo, sed ankaŭ por solvi problemojn de ilia restado, kiel havigo de oficialaj dokumentoj aŭ iu ajn alia helpo. Ni petas al la bona Dio, ke li premi lian ĉiam bonan agadon kun ni ĉiuj.

Malgraŭ tio, ke pluraj el liaj amikoj estis for de la urbo pro la somera ferio-periodo, lian funebran ceremonion ĉeestis kvindeko da samideanoj, inter ili la reprezentantoj de la organizacio Kultura

Asocio Esperantista (KAE), kies komitatano li estis ekde ĝia fondiĝo en 1986.

Al la tuta familio, precipe al liaj edzino kaj filo, kiuj multe helpis kaj apogis lian konstantan laboron por Esperanto, ni manifestas nian profundan kondolencan. Ripozu en paco, kara amiko!

Luis M. Hernández Izal

### Forpaso de aktiva esperantisto

La 31an de Aŭgusto 1996, mortis 60-jara, en la urbo Sabadell, la malnova HEF-membro, s-ano Victor Sanfeliu Badell, aktiva esperantisto, nevo de la tiea SAT-pioniro, la bedaŭrata k-do Petro Casanovas Manent. Al lia edzino Natalia Balart, patrino Anĝela Badell —ambaŭ esperantistinoj— kaj cetera familio, nian plej profundan kondolencan.

## Kunlaboru kaj... gajnu monon!!!

Se vi partoprenas E-aranĝon kaj faras fotojn, vi povas sendi la plej bonajn al la redakcio de HEF. Por ĉiu publikigita foto, la redakcio rekompencos vin per kupono de 300 pesetoj por aĉetado de varoj ĉe la libroservo de HEF.

Kaj, se vi tion deziras, vi povos rehavi la foton, ĉar la redakcio resendos ĝin al vi tuj post ĝia utiligo!

Memoru ke la fotoj devas esti klaraj, interesaj, kaj bone enfokusigitaj. Nu, kuragon kaj... ek al la laboro!


## HEF bonaj servoj

# 50



En 1997

## HEF bonaj servoj



# Viglas la movado

## En publikaj vendejoj

Kun la celo diskonigi inter la ĝenerala publiko la ekziston de libroj en kaj pri Esperanto, Libro-Servo de HEF kaj nia kolego Miguel Gutiérrez Adúriz metis je la dispono de publikaj librovendejoj plurajn librojn en aŭ pri Esperanto. En Valladolid, en librovendejo proksima al la Universitato, nia Libro-Servo prezentas plurajn titolojn. En Santander la kvar plej gravaj vendejoj ofertas la lernolibron *“Esperanto, Curso del idioma internacional”*; same en Madrido “Don libro” kaj “La casa del libro”, en Salamanca “Forum”, en Sevilla “Interbook”, ktp.

Nu, la relanĉo de HEF, komenciĝinta en 1993, iras sur bona vojo, kaj certe ĝi atingos sian kulminon en 1997, Jubilea Jaro de HEF!

## Bibliotekoj

Madrida Esperanto-Liceo lanĉis kampanjon por provizi la bibliotekojn de la ĉefurbo per e-aj lerniloj kaj informiloj. Tiucele oni disdonis la libron *“Esperanto: Curso del idioma internacional”* kaj *“El Esperanto: fenómeno de la comunicación”*. La semado estis sendube fruktodona, ĉar pluraj interesitaj junuloj jam kontaktis kaj eĉ vizitis la Centran Oficejon de HEF. Fakte, la apero de la adreso kaj telefonnumero de HEF en la libroj tre helpas.

MEL, ĉi-foje kune kun HEF, decidis

do pliampleksigi la kampanjon kaj fine de ĉi aŭtuno oni liveros po 30 ekzemplerojn de ĉiu verko al sama nombro da bibliotekoj. *Ni semas kaj semas konstante...*

## Guardamar del Segura

Kiel kutime, organizita de nia kolego José Mũ Bernabeu, okazis en la strando de tiu ĉi bela urbeto la ĉiujara kunveno de geesperantistoj murcianoj kaj valencianoj, kun la sola celo ripozi, konversacii, ĝui dum unu kompleta tago enviinda esperantista etoso inter pinoj kaj milda marborda brizo. Je la 12a horo okazis senprotokola kunveno por komenti eventojn kaj problemojn de la UEA-kongreso okazinta en Prago, la venontjaran HEF-kongreson okazonta en Valencio, la interregionan kongreson Valencio-Murcio kaj aliajn temojn pri nia Movado. La partopreno de esperantistoj estis pli ol kontentiga, kaj de frue en la mateno ĝis vesperiĝo plenumiĝis la celode la Renkontiĝo: amuzo, ripozo, distro kaj agrabla konversado.

## Kantabrio

Kantabra Esperanto-Asocio lanĉis en oktobro sian aŭtunan kampanjon por altiro de novaj gelearnantoj. Danke al pluraj anoncoj en la lokaj radioj kaj ĵurnaloj, nun okazas du kursoj ĉiutage, kvankam venis petoj por aranĝi pli da kursoj! Entute 20 divers-aĝaj gelearnantoj ĉeestas la klasojn.



Antonio Madrazo Aranguren  
Pres. de Kantabra Esperanto-Asocio

Kiel rezulto de la ĝenerala intereso, loka ĵurnalo aperigis tutpaĝan artikolon pri Esperanto kun foto de la klaso, kaj eĉ informo pri la Manifesto de Prago. Ankaŭ la universitata asocio *Interaulas* interesiĝis kaj organizas prelegon por la fino de novembro.

## Ĵurnaloj

Laŭlonge de la jaro, ne malmultaj artikoloj pri Esperanto aperas en la naciaj ĵurnaloj. Nia lando estas ja tre granda kaj, konsekvence, foje la esperantistoj de iu komunumo ne scias kion oni faras en la aliaj partoj de la ŝtato. De nun, plenumante decidon de la Estraro, la Biblioteko Juan Régulo havos apartan fakon por konvene teni ĉiujn artikolojn pri Esperanto aperintajn en ajna hispana ĵurnalo aŭ revuo.

Do, por ke la kompilado estu kiel eble plej sukcesa, la E-grupo el la koncerna regiono, aŭ aparta esperantisto, devos sendi al la C.O. la paĝo(j)n sur kiu(j) aperas la artikolo. Tre grave: atentu ne eltondi la artikolon, sed sendi la TUTAN paĝon.

## Paĝon en internet

Nia estimata samideano kaj amiko Jesus de las Heras, informas, ke li aranĝis TTT-paĝon en Internet pri kaj —parte— en Esperanto, kun la nomo *Esperanto España*. Se oni volas legi ĝin, oni devas tajpi lian adreson <http://www.mur.hnet.es/uphm/jesuo/espe.html>.

Elstaraj esperantistaj responsuloj el diversaj landoj jam sendis al nia amiko Jesus de las Heras gratulojn pro tiu paĝo speciale taŭga por propagando, la plej aktuala sistemo moderna por tiu celo. *Boletín* gratulas tutkore al nia samideano Jesus kaj ni esperas ke la hispanaj uzantoj informu al li pri la plej interesaj anekdotoj okazontaj en la uzo de la reto.

## Kongreso kaj E-Festivalo

En majo 1997 en la sudgermanaj urboj Aalen kaj Stuttgart okazos la *Eŭropa Esperanta Kultura Semajno*, kiu konsistas el tri sinsekvaj aranĝoj: Esperanta Kultura Festivalo en Aalen, Eŭropa Junulara Parlamento kaj Eŭrop-Unia Esperanto-Kongreso en Stuttgart. Ĉar venontjare la UK okazos ekster Eŭropo tiu aranĝo certe estos unu el la plej granda Esperanto-Kongreso en Eŭropo en 1997.

La Esperanta Kultura Festivalo (10-13/05/1997) okazos laŭ eksplicita invito de la urbo Aalen, kiu ankaŭ jam dum multaj jaroj subvencias la Germanan Esperanto-Bibliotekon kaj ĝi ankaŭ finan-

ce subtenos la Festivalon. Jam estas certe, ke ĉeestos *Kajto kaj Ĵomart kaj Nataka*.

La Eŭropa Junulara Parlamento (13-16/05/1997) allogu speciale junajn esperantistojn. En la programo estas antaŭvidata diskuto kun reprezentantoj de pacaj kaj ekologiaj asocioj kaj politikistoj de diversaj partioj.

La Eŭrop-Unia Esperanto-Kongreso (16-19/05/1997) estas la komuna kongreso de la asocioj de dek landoj.

La kostoj por hoteloj en Stuttgart kaj Aalen estas ekde ĉ. GM 40, por unu persono kaj unu nokto. Ni provos provizi lokojn en junulargastejo (en urbocentro) ankaŭ por pliaĝuloj.

Informoj: Frank Stocker, Obere Neckarstr., 13. D-69117 Heidelberg. Germanio.

## Interlingvistoj kaj esperantologoj

En Esperanto kaj diversaj lingvoj aperas pli kaj pli multe da ofte malfacile trovebla scienca materialo pri interlingvistikaj kaj esperantologiaj temoj, gravaj por sciencaj studoj kaj esploroj.

Seriozaj interlingvistoj kaj esperantologoj klopodas sekvi la fakan literaturon. Tion grave faciligas *Informilo por Interlingvistoj (Ipl)*, kiun eldonas Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED). La aktuala (tria) serio startis en 1992. Aperis ĝis meze de 1996 entute 17 numeroj kun sume 156 paĝoj, plenaj de utilaj informoj, plejparte bibliografiaj.

Ipl estas abonebla ĉe UEA (Nieuwe



Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando). Seriozaj interesitoj el landoj kun transpagaj problemoj povas laŭpete ricevi lpl senpage. *Informilo por Interlingvistoj* estas redaktata de d-ro Detlev Blanke (Otto-Nagel-Str. 110, DE 12683 Berlin, Germanio), kiu volonte akceptas materialojn pri ĉiuspecaj interlingvistikaj aktivecoj, projektoj kaj publikajoj.

## Esperanto-Ekspozicio

En 1997 la Esperanta Asocio de Limoges (Francio) organizos la 52an SAT-amikaran kongreson en la kultura centro Beaubreuil. Okaze de tiu renkontiĝo ni celas starigi Ekspozicion de kiel eble plej multaj revuoj el la Esperanto-gazetaro.

Ĉu la eldonantoj de hispanaj E-revuoj estus tiel afablaj kaj sendus ekzempleron kun indiko de la peranto de la revuo por Francio kaj de ĝia prezo? Antaŭdankon.

## Ruĝa Kruco

En la lasta numero (majo-junio 1996) de la Internacia Revuo de la Ruĝa Kruco, eldonita de tiu Internacia Asocio en Ĝenevo (Svisio) en la hispana, franca, angla, araba, rusa kaj en la reto internet, aperas artikolo sub la titolo «Homama aktivado de la E-movado en la du mondmilitoj sub aŭspicio de la Internacia Ruĝa Kruco» verkita de nia kordova samideano José Mú Rodríguez Hernán-

dez, en kiu li informas pri la homama agado de la Esperanta movado en ambaŭ militoj per Esperanto kaj citas kiel ekzemplon, inter aliaj, la gastigadon de konsiderinda nombro de aŭstriaĵ infanoj en nia lando dum unu jaro kiam terura mizero regis en Centra Eŭropo. La projekto estis kunordigita de la prezidanto de *Frateco* de Zaragozo s-ro Emilio Gastón kaj la Stiria Esperanta Societo (Aŭstrio) prezidita de la elstara aŭstria esperantisto Karl Bartel.

La ampleksa artikolo, interesa laŭ diversaj aspektoj, ne nur estas tre bone redaktita, sed ĝi ankaŭ signifas efektivan propagandon por Esperanto, ne nur ĉar ĝi esprimas tiun idealismon tradicie esperantistan, sed ĝi ankaŭ montras kiel la ideoj havas en nia kazo pragmatan aplikon de la ideo al la kampo solidara interhoma. La Redakcio de *Boletín* gratulas tutkore nian andaluzan kamaradon!

## Fotoj

La biblioteko de HEF, Juan Régulo Pérez, nutros sin ne nur per libroj, sed ankaŭ per fotoj.

Ĉiuj notu bone ke laŭ la deziro de la Estraro, la biblioteka respondeculino, Maritza Graciani, disponigos apartan fakon por movadaj fotoj. Do, de nun, la fotoj kiujn vi sendos por *Boletín*, estos pagataj al vi, kiel ni jam informis en la antaŭa bulteno, kaj, post ilia aperigo, se vi ne oponas, iliiros rekte en la arkivon de la biblioteko, kie ili restos kiel verbaj atestantoj de nia historio.

## LIBRO-SERVO DE HEF

La 15an de decembro, naskiĝ-datreveno de d-ro Zamenhof, estas ankaŭ la Tago de la Libro en Esperanto. Okaze de tiu festo kaj la festoj de Kristnasko kaj Novjaro, Libroservo de HEF donacos al ĉiu mendanto de libroj, dum la periodo de la 15a de novembro ĝis la 15a de januaro 1997, rabatkuponon kies valoro estos 10% de la sumo de la menditaj varoj. La kupono validos por estontaj mendoj, laŭ la kondiĉoj menciitaj sur la kupono mem.

ATENTU la jenajn titolojn:

La verkon de Miguel Fernández *El la sonoraj soloj*, brila juvelo de la plej bona poezio ekzistanta nun en Esperanto. Emanas el la poemoj de Miguel: ritmo, muziko kaj lirikaj partoj envolvitaj en amoplenaj revoj kapablaj frandi kompletan tagon al sentiva homo...


*Laboristaj Kronikoj pri la Hispana Esperanto-Movado*, de Antonio Marco Botella, kiu rakontas dramajn sociajn kaj politikajn eventojn okazintajn en nia lando kaj en Eŭropo al la esperantista kolektivo: idealismo, doloro kaj oferemo de hispanaj samideanoj apenaŭ ĝis nun konataj...

*ESPERANTO, Curso del idioma internacional*, de Miguel Gutiérrez Adúriz, moderna libro por instruado de nia internacia lingvo. Lernolibro kun multaj desegnoj kaj aldona kalendaro kun la solvo de ĉiuj ekzercoj proponitaj en la libro.

*Lirikaj perloj de Al-Andalus*, de Antonio Marco Botella, primera antologio en Esperanto pri hispana-araba-hebrea liriko, bele ilustrita per fotoj kaj desegnoj de arthistoriaj monumentoj hispanaj-arabaj-hebreaj, ankoraŭ nun ekzistantaj en nia lando, kun biografioj kaj poemoj de la plej elstaraj poetoj el la mezepoko.

Mendu tuj ĉi juvelojn ĉe

Libro-Servo de HEF, Apartado 119; 47080 Valladolid. Hispanio.



# Nun estas pli facile! HEF

Telefone kaj fakse  
91-446-80-79

Rete (komputile)  
[esperanto@canaldinamic.es](mailto:esperanto@canaldinamic.es)

La Univeritato de Murcio okazigis ĉijare de la 17a ĝis la 19a de oktobro sian prestiĝan seminarion pri Al-Andalus. Venis fakuloj el Francio, Britio, Usono, Maroko, Libano, Egipto kaj Hispanio. Oni debatis la teoriojn de la hispan-araba mistikulo Ibn Arabi (Murcio 1164 Damasko 1240) kaj oni substrekis la bezonon traduki la biografion de la saĝulo al pluraj lingvoj, ĉar ĝi ekzistas nur france, angle kaj hispane. Tiam intervenis d-ro Pérez Óvilo klarigante ke ankaŭ ekzistas traduko en Esperanto. Li prezentis la verkon *Lirikaj Perloj de Al-Andalus* de A. Marco.

Post la debato, d-ro Pérez Óvilo private informis la eksterlandajn profesorojn pri la libroenhavo, kaj pri la fakto ke la institucio "Fernando el Católico", eldoninto de la verko, malavare disdonis senpage pli ol cent ekzemplerojn al E-Akademianoj, al Universitatoj de la tuta mondo kaj eĉ al pluraj E-rondoj en Afriko (Zairo, Togo...), kie oni uzas la libron por legado en la kursoj por progresantoj.

La brila rezulto estis ke, la prestiĝa Internacia Seminario estis brile fermita post recitado de unu el la plaj bonaj poemoj de Ibn Arabi fare de s-ro Jesus de la Heras.

La murciaj ĵurnaloj informis pri la fermo de la Seminario per poemo en Esperanto. Nu, certe tiaj sukcesoj ne oftas.

Virino el Bosnio, loĝanta de tri jaroj en domo de rifuĝintoj de la urbo Niš, en Jugoslavio, petas ke ni helpu per sendado de uzitaj ŝuoj (n-ro 40) kaj vestaĵoj (n-ro 44). La pakajo ne pezu pli ol 7 kilojn, ĉar alie ŝi devus pagi doganimpостоjn. Adreso: Vera Šarenac; Bulevar Lenjina 74/23; 18000-NIŠ; Jugoslavija

## 56a Hispana Kongreso de Esperanto

Krom prelegojn, debatojn kaj kunvenojn vi havos la eblecon ĝui la aranĝojn de la valencia "Julia Foiro" kaj de la Internacia Festivalo de Blovorkestroj, kiuj koincidas kun nia kongreso. Pensu ke la koncertoj, kabalkadoj, teatraĵoj, artfajraĵoj, folkloraj aranĝoj, ktp, estos grandparte senpagaj!

En la Kongreso aparte brilos la prezento farota de la Ibera grupo (M. Fernández, Jorge Camacho, Liven Dek, Gonçalo Neves), kaj la sinprezento de Akademianoj de Esperanto kaj de la Internacia Akademio de la Sciencoj de San Marino (AIS). Kompreneble estos bongusta paelo (paella), tuttaga tipe hispana kampara festo, ekskursoj tuttagaj kaj duontagaj, prelego de Miguel Fernández, folklorajojn, muzikon...

1997 fariĝos festojaro por la hispanaj esperantistoj, kaj la kongreso estos sendube ĝia kulmino. Jes, ni festos la **50an datrevenon de...** divenu, divenu.

# DIRI VIAN NOMON, ADA FIGHIERA-SIKORSKA

19

*Miguel Fernández*

Ja diri vian nomon egalas diri vivon. Tial mi ĵus min palpis por konstati, ke mi vigilas meze de pleja, koŝmareska, sensencaĵo: Ada mortis. Vi mortis. Kaj tuta bando da nigraj papilioj trasturmas mian koron. Ve, kiel povraj la vortoj sin proponas! Ho, se ni havus ĝustan paŭsilon de la sentoj! Mi nek ŝatas nek scias oracii: akcepti, ke forpasis mirindaj ensorĉitoj de la vivo, ĉar tio duonveras. Per siaj spuroj ili sin transvivas. Mi nek ŝatas nek scias oracii, ĉar, kiel viv-amanto, mi devas plendi ne kontraŭ la morto, sed, malgraŭ ĉio, ja kontraŭ la vivo, sendanka, neglektema. La morto, frida lago, nome fluaj-amaso nefluanta —kulmino de l' absurdo!— diligentas: altiras ĉies tempojn aŭ riverojn en sian faŭkan sinon. Dume la vivo, tamen, tia deliro bunta kaj envulta, preteratentas ĝuste la grandajn konviktitojn pri viv-amo. Sed tiuj fine venkas: per siaj spuroj ili sin transvivas.

Ja diri vian nomon egalas diri homon kaj fajraĵon. Kiel torentis via parolado! Kiom de via koro senseblis algluita ĉiuvorte! Jam la unuan fofon, kiam mi, esperanta neofito, aŭskultis vin konversi kun kompano trans muro de klasĉambro, mi tuj eksciis, ke la verda revo manifestiĝas vorte, per



belo plej vitala kaj palpebla. De tiam mi, freneza vort-amanto, verso-post-verse, ade pilgrimas lingvo-sinen. Kaj ofte rememoras la tiamon; la tuŝon de homeco, kiun vi ĉiam donis al idealoj kaj ĉiutagaĵoj; vin kaj Gian Carlo ĉe la MEL-a(1) rondo, novlimfa, sprita, nombra, vulkaneca, kiam lerni de vi kaj via edzo signifis, krom luksaĵo, malkovri sin tutmonda sune, feste, sin senti aŭskultata, malgraŭ novbakiteco, spronfervore. Mi ofte rememoras vian domon ĉe strato de poeto —de la poeto Juan Ramón Jiménez—; viajn delicajn kukojn; vian gajon... Sed plej neforgeseblas la momento, kiam nur vi, surprize, legante tra la steloj sur mia okulparo, divenis min amstata: “Jes, ŝi nomiĝas Carmen!” mi ekmiris. “Vi meritas feliĉi” vi gratulis. Nu, tiaj okulsteloj restas plue. Tutsame vi scintilas, ĉar vi per viaj spuroj vin transvivas.

Ja diri vian nomon egalas diri ĝojon kaj patrinon. Kiel sane fiera vi ĉeestis miajn prezentojn kantajn kaj deklamajn! Kia panja kontento vin halois, ĉe ajna konkretiĝo de miaj emoj —amoj— poema kaj muzika! Lastfoje, pasintjare, en via nasko-lando. Unue Gdanske; poste, Varsovie. Via hela mieno, inter la milda bluo de Vistulo kaj la verdo tilia kaj salika de la pola ĉefurbo, freŝas plue, samkiel la gastamo flora, nobla, de via tuta rondo varsovia. Freŝas via tiama

arda strebo edzigi Hispanion kun Pollando. Freŝas via "ĝis baldaŭ" flughavena. Nun mi, eĉ pli ol tiam, ĝojas pri tiu lasta renkontiĝo, pri tiu lasta bildo radia kaj patrina, antipoda de l' tempo kaj la

neĝo, fremda al ĉi aŭgusto senkapa kaj senbrida, kiu vin kaj la rozojn ektimigis. Nur tion ĝi atingis. Nune, eĉ pli ol iam ajn antaŭe, la jenaj versoj sencas, ĉar vi per viaj spuroj vin transvivias:

## ELVOKE (2)

Al Ada kaj Gian Carlo Fighiera,  
miaj esperantaj gepatroj

Relikvo sur la lango: viaj nomoj:

sapor' je polonez' kaj barkarolo.

Kaj Madrido

fulminas, retroskizas

sian sideran emon ĉiesi, primaveri.

Kiel jubile salvis tago-grajnoj!

Kiel la glandoj skercis unusone!

Kiel eĉ la negita iamo rosmarenis!

kiam la historio

skribiĝis re —skribiĝis ruĝainke—,

kaj la futur' ankoraŭ bunte bravis,

kiam vi venis. Vi

venis el vivpostulo, el suspiro

de unu el la eblaj eldoradoj,

kie la amo vorten transiĝas por ampleksi

la tuton de la maroj kaj la amoj.

Vi portis en l' animo konjunkcie

asteroidojn el pasi' vulkana

kaj el ĉelar' abela,

ŝuŝojn el silvo, mirhon kaj lunarkojn

el nepra pilgrimado

—ho mordoj far la lasta inkubo de Eŭropo!—

de tajg' al minaretoj, mil florenceojn

da humanisma lum' kaj eleganto.

Vi portis l' evidenton kaj la forton

de l' verda univers' revolucia.

Kaj gepatris  
 mirindajn envultitojn  
 de l' vorto sen patri' kaj damna gloro,  
 gepatris ankaŭ min,  
 florigis miajn sensojn  
 al la sonor' tutmonda,  
 al la cikut' plej dolĉa,  
 al ĉi frenez' aŭ amo: poezio.

Laŭ via vizitkarto, vi foriris.  
 Ĉu vi foriris iam? Ne. Ne veras.  
 Via sopiro pendas  
 rubande je l' madrida firmamento.

Nun griza fumobrak' sin disetendas  
 celante stompi l' mondon animŝtele,  
 fari el belo varon; el justo, karitaton;  
 el la racio, gurdon; unton el nia kanto.  
 Kaj tial endas palpi  
 disfoje l' ĉielpulson kaj birdadi  
 al la plej alta tur' de via fido  
 —sur kies krenel-musko ripozas mia revo—  
 por sensi, ke transfume ni pluspiras.

(1) MEL = Madrida Esperanto-Liceo.

(2) Poemo verkita de la aŭtoro en julio 1995 por la kolekto *El miaj sonoraj soloj*, Miguel Fernández. Vieno: IEM, 1996. 100 p.

## ADA

*Jorge Camacho*

Skribi nekrologon pri vivanta amiko estas tasko ne nur malagrabla, sed mem makabra. Tamen oni ĵus komunikis al

mi, ke Ada Fighiera Sikorska troviĝas en la fina stadio de malsano, kaj petis, ke mi verku noton pri ŝi. Pri Ada. Kion mi diru? Ĉu la kutimajn biografiajn erojn? Tiujn oni povas legi en revuo *Esperanto* (n-ro 1063), oktobro 1994, p. 167, kiam ŝi ricevis la distingon *Honora Membro de UEA*. Ĉu mi parolu pri ŝia 34-jara redaktado de *Heroldo de Esperanto*, pro kiu oni pleje konas ŝin? Ĉion ĉi ŝi mem rakontas en la sama revuo, unu jaron pli frue (n-ro 1048, majo 1993, p. 92) en la

intervjua artikolo *La rekordo de Heroldo*.

Mi do skribos pri Ada persone, sidante en mia hejmo en Bruselo, la sama urbo, kie multajn jarojn loĝis Gian Carlo Fighiera kaj Ada antaŭ ol transiĝi al Madrido. La bruselanoj, kiuj konas ilin de tiu tempo, senescepte parolas pri ŝi pozitive kaj ame. La samon mi asertas pri ĉiuj, kiuj havis la plezuron konatiĝi kun ili en Madrido: Augusto Casquero, Miguel Fernández, Ana Montesinos kaj multaj aliaj, inter ili ankaŭ mi. Ne nur amike, sed ame. En mia kazo tiel, kiel oni amas gepatrojn, aŭ adoptajn gepatrojn. La ideon mi ne kopias de la poemo de Miguel Fernández dediĉita al ili (*Elvoke*, en *El sonoraj soloj*): ni simple ĝin kunsupertis.

Fakte ne eblas paroli nur pri Ada sen Gian Carlo: por mi ili formas pensunuon, paron nedisigeblan eĉ koncepte. En la komenco de la okdekaj jaroj, tuj post mia esperantiĝo, la ĉeesto de Ada kaj Gian Carlo en Madrido montriĝis decida por ĉio sekva. Mi, tiam malpli ol dudekjara, vizitis regule ilian hejmo, komence kun aliaj esperantistoj (ekzemple, kiam ili invitis la klubanojn ĉe sin), poste sola, por helpi en la ordigo de la vastega librokolekto de *Heroldo*. Jen la unuaj eksterlandanoj, polino kaj italo, kun kiuj mi konversis en esperanto (aŭ entute, se ne nomi konverse simplan peton de akvoglaso). Ilia hejmo estis regalejo: lingve, libre (krom la donacitaj duoblaĵoj el la kolekto, ankaŭ la recenzekzempleroj por *Heroldo*, kiuj instigis, stimulis kaj vartis mian recenzan karieron) kaj frande (mi tuj rememoras la bongustan *negreto*, ĉokolada kuko kiun

Ada ofte prezentis panacee).

Viziti ilin signifis viziti oazon de esperanta kulturo, kaj de kulturo ĝenerale; renkonti paron amikan, pozitivan kaj bonkoran; alivorte: travivi kaj traĝui esperanton. Ĉe Ada kaj Gian Carlo, fine, ebligis mia unumonata restado en Bruselo en 1985, sen kiu mi ne estus vizitinta Roterdamon nek la UK-on en Aŭsburgo nek kiu-scias-kion...

Nun, kiam ŝajnas, ke Ada foriras, mi povas nur citi kelkajn versojn el *Elvoke*, de Miguel Fernández, verkitajn certe en kunteksto pli gaja:

*Laŭ via vizitkarto, vi foriris.  
Ĉu vi foriris iam? Ne. Ne veras.  
Via sopiro pendas  
rubande je l' madrida firmamento.*

## FORPISIS ADA SIKORSKA

*Juan Carlos Ruiz Sierra*

MEL kondolencas s-anon Gian Carlo Fighiera pro la forpaso de lia edzino, Ada Fighiera Sikorska. Kiel geesperantistoj, geedzoj Fighiera profunde transformis la movadon en nia lando, ĉefe en Madrido, urbo kiu havis la honoron ilin gastigi dum naŭ jaroj. Ili organizis la konversacian rondon nomatan Parolata Gazeto, sugestis multajn plibonigojn rilate esperantaj kongresojn, invitis al Madrido prestiĝajn geesperantistojn kun diversaj motivoj (Simpozio pri

Sporto, Nacia Jubilea Kongreso en 1987, ĉi lasta kun partopreno de i.a. ilia gasto W. Auld, ktp); ili estis ĵurianoj en literaturaj konkursoj; ili translokis la redaktejon de *Heroldo* al Madrido, partoprenis la redaktadon de la dokumento *Datos acerca del movimiento esperantista en España: 1887 - 1987* kaj ties reeldonon en 1993, kiu forte kontribuis al la fakto, ke HEF ricevis la oficialan konsideron "Asocio kun publika utilo", kaj tiel plu.

Ada, ekzemplo de esperanta entuziasmo, estis la redaktorino de *HdE*, daŭrigante la laboron de sia majstro, Teo Jung. Hispana Esperanto-Muzeo kaj HEF honoris ŝin per la medalo Klara Silbernika. La laboro de Ada kiel zorgantino pri publikaj rilatoj en la esperanta movado (bankedoj, fotoj, artikoloj, radio-programoj, specialaj kongres-numeroj de *HdE* dum la 78-a UK en Valencio, ktp), ŝia pozitiva sinteno fronte al la malfaciloj de la vivo kaj ŝia ekzempla kaj digna lukto kontraŭ la malsano mirigas kaj emocias eĉ la bonajn amikojn, kiuj konas ŝian feran volon.

Mi neniam forgesos la impreson ricevitan post la tralegado de *De tajgo al minaretoj*, sintezo de taglibreto de la 11-jarulino Ada, kie ŝi, en leteroj al sia amata onklino Lunia, rakontis siajn proprajn travivaĵojn dum la dua mondmilito, kiam ŝi, deportita de la sovetanoj, same kiel centoj da miloj da gepoloj tiuepoke, devis vagadi kelkajn jarojn tra Samarkando, Irano, Libano... antaŭ ol reveni en Pollandon. La teruraj vivspertoj dum tiuj jaroj, priskribitaj en infanca sed forta stilo, esprimas la nevenkblan optimismon kaj pozitivecon fronte

al la malfaciloj, kiuj ĉiam karakterizis Adan. La ekzemplo de Ada kaj Gian Carlo plu restos ĉe la koro de ĉiu MEL-ano. Pace ŝi ripozu.

**Al la admirinda kaj brila  
poeto Aldo de 'Giorgi.**

## **IBN HAMDIS, ELSTARA SICILIA POETO**

*Antonio Marco Botella*

La periodo de la regado araba en la insulo Sicilio ne estis longedaŭra, kompare kun tiu de Al-Andalus (Iberio). Post kelkaj sporadaj ekskursoj de arabaj trupoj kontraŭ la bela insulo, kun la sola celo esplori kaj forrabi riĉaĵojn, estis dum la jaro 827, kiam unufoje arabaj trupoj regantaj Nordafrikon ekkonkeris la insulon, kaj en la jaro 831 jam ili okupis Palermon.

Forpasis preskaŭ unu jarcento en internaj militoj inter diversaj rastrupoj ĝis la fatimioj (1), okupantaj ampleksajn nordafrikajn kaj siciliajn teritoriojn, starigis kalifujon, kies ĉefurbo estis, unue Media, ĉe Tunizio, kaj poste Kairo, en la miljara Egipto.

Je la duono de la 10 jc., Palermo iĝis jam tre bela urbo, kun pli ol 300 moskeoj



kaj belaspektaj konstruaĵoj, dum la siciliaj kampoj, per nova araba irigacia sistemo, surbaze de centoj kaj centoj da norioj, akvumis la riĉajn siciliajn grundojn, kie frutis oranĝoj, vinberoj, kotonno, mirho, safrano, ktp. Paralele al tiuj riĉaĵoj sur la kampoj naskiĝis grava industrio, kaj scienco kaj poezio invadis la salonojn de la alkazaro de Palermo, kiu baldaŭ iĝis kunvenejo de kantistoj kaj poetoj. Simile kiel jam okazis en Al-Andalus, sciencistoj kaj poetoj alfluis al Sicilio, kie ili serĉis kaj trovis protekton por ilia intelekta aktivado.

Ekfloris dum tiu ĉi periodo multaj bonaj poetoj en Sicilio, inter kiuj la plej grava estis Ibn Hamdis.

Abū Muhammad 'Abd al-Yabbār ibn Hamdis naskiĝis en Sirakuzo, en la jaro 1055. Dum sia junaĝo li estis homo impeta, tute ne adaptiĝema al iu ajn trankvila medio: batalema, pasia kaj diboĉema, tamen li jam lerte mastrumis la poezion kaj sciis esprimi siajn sentojn en tiuj cirkonstancoj kaj aliaj kiuj profilis sian vivon. Jen kiel li priskribis unu el tiuj diboĉemaj impresoj:

## I

Ha!, oni alportu vinon  
kaj virinon belaspektan!  
Jam la ektagiĝo klaras,  
kaj la nokto duonsvena  
ja invitas al plezuroj,  
antaŭ ol ĉiel' mistera  
adiaŭos gajan nokton  
en marŝad' nehaltigebla...  
Se vi celas tiun ĝuon,  
per pied' sandal-leĝera  
hastu trinki tiun vinon,

antaŭ ol l'aŭroro pretas  
sorbi la kristalajn larmojn  
kisante la florojn belajn,  
kiam suno ekleviĝos  
sur la horizont' orhela.



## II

Mi, el am' ankias kore  
ravmagian sentintenson,  
ŝanĝe de kiseĝo mia  
mi vin petis kistorenton;  
kaj per tiuj ardaĵ kisoj  
trovos mia kor' kompenson,  
ne ekzistas font' pli pura  
por satigi soifsenton!

## III

Murmuras trankvila roĝo,  
milde kisas ĝin sunhelo,  
tiel ame ĝin poluras,  
ke spegulas ĝi ĉielon!  
Ŝajnas, ke ĝi ve-sopiras,  
ĉar en ĝia korinterno  
vundas ĝin ŝtonegoj akraj  
de malĝojaj amosentoj...  
Eble, amo malfeliĉa

ploras l' amindiferenton  
kaj al lago haste iras  
por sepulti amĉagrenon! (2)

Pro cirkonstancoj ankoraŭ ne bone konataj, Ibn Hamdis forlasis sian patruon kaj en la jaro 1078 vojaĝis al Sevilo, kie loĝis la plej eminentaj poetoj el Okcidento, kaj klopodis eniri je la servo de la reĝo al-Mutamid. Ne multe atentis lin la sevila reĝo, kaj jam li pensis forlasi la kortegon, kiam certan nokton venis rajde servisto de al-Mutamid, kiu, nome de la reĝo, petis lin veni palacen. La sicilia poeto obeis la ordonon kaj jam en palacosalono la reĝo ordonis lin sidi kaj tuj diris al li:

—Malfermu la fenestron plej proksiman al vi.

Li malfermis ĝin kaj perceptis iom malproksiman vitrofornon en kiu oni laboris. En la mallumo oni vidis vivan fajron, kiu brilis post la pordoj, kiuj jen malfermiĝis jen fermiĝis. Unu el la pordoj de la vitroforno estis longa tempo fermita kaj malfermita la alia. Dum Ibn Hamdis rigardadis ilin, la reĝo subite lin demandis:

—Respondu al la jenaj versoj:

—Kio flame brilas en la ombro densa?

La poeto respondis:

—Malsata leono, kiu ĉasaĵon serĉas!  
Al-Mutamid daŭrigis:

—Malfermu la okulojn kaj poste ilin fermu revemaj!

La poeto replikis:

—Kvazaŭ tiu, kiu post dolor' resaniĝon esperas!

Al-Mutamid insistis:

—Okullumon de vi prenis por kaprica sorto.

Kaj la poeto kompletis:

—Ne eskapas el destino la plej forta nek la morto!

Al-Mutamid tiel kontentis pri la respondokapablo al liaj improvizitaj poeziaj demandoj, ke li ordonis transdoni al la poeto malavaran donacon, kaj tuj akceptis lin kiel poeton de la Sevila kortego (3). Kiel niaj legantoj bone scias, tiu kvazaŭpoezia ludo konsistanta el improvizo de versoj, kiujn devis respondi verse alia poeto, estis unu el la ludoj plej uzataj de la reĝo-poeto al-Mutamid, kaj ekzemplojn kiel tiu oni povas legi en la verko *Lirikaj perloj* kaj aliaj pri sama temo.

Ibn Hamdis sin sentis tiel kontenta ĉe la Sevila palaco, ke li, krom partopreni en la grandaj festoj organizitaj de la reĝo kaj en la recitaloj muzikaj kaj poeziaj, ankaŭ akompanis lin al la batalkampo, kie brave batalis. Kaj, kiel ekzemplon pri lia kuraĝo en batalado apud al-Mutamid, oni citas la batalon de Talavera, kie, renversite de sur sia ĉevalo li saltis denove sur ĝin kaj ĉiam troviĝis en la plej danĝeraj lokoj.

Kiam la dinastio Abbadia falis viktimo de la berberaj afrikaj fanatikuloj, Ibn Hamdis restis fidela al la reĝo al-Mutamid kaj sekvis lin ĝis Agmat (Afriko), kie la siciliano dediĉis al la malfeliĉa kaptito elegiojn kaj konsolpoemojn. Ankaŭ ne Ibn Hamdis forgesis sian karan insulon, kaj al ĝi dediĉis plurajn poemojn, kiel ĉi tiuj versoj:

Pri l' amata revinsulo,  
en mia memor' sentiva  
gardas mi la dolĉspiriton  
de amo al ĝi plej viva.  
Kiel ĉe la ombraj boskoj  
la sovaĝa lup' rabia  
disvastigas malfeliĉon  
tra l' bedaro sicilia...

Ankaŭ tie Eden' estis  
kun marondoj plej fascinaj,  
kie nur plezuro regis,  
kaj la malfeliĉ' neniam.  
Tie la gazel' timema  
kun mi ludis plengracia,  
kaj leon' min akompanis  
en la ludoj plej malicaj.  
La matenaj sunradioj  
sur mi lumis blanke brilaj  
kaj min rave ebriligis,  
kiam tag' fuĝvesperigis.  
Se iame, navigante  
ĉirkaŭ viaj strandoj mildaj,  
fine mi ĉe vi alvenus,  
estus mi ja atinginta  
revon pleje sopiratan  
kaj la ĝuon paradizan!  
Estus kvazaŭ plena luno  
min kunportus plej ĝentila  
ĝis la valoj revoplenaj  
de l' amata Sicilia! (4)

Ibn Hamdis elvokis ofte la teron, kie  
li naskiĝis, kaj idealigis ĝin per siaj ver-  
soj, tiel kore sentitaj versoj:

Tiuj fruktodonaj kampoj  
antaŭ mi ja sin prezentas

kvazaŭ en mirindaj sonĝoj  
image nesupereblaj...  
Tie ripozadas l' ostoj  
de la miaj plej aŭtentaj:  
avoj, patroj, pra-praavoj.  
la prafamilio plena,  
amoj, junamikoj, revoj,  
l' iluzioj am-pritempaj!  
Ĉiam mi vin rememoros!  
Ho, insul' neforgesebla! (5)

Post la malvenko de al-Mutamid fare  
de fanatikaj almorabidoj kaj sekva ma-  
lapero de la brila Sevila kortego, Ibn  
Hamdis forlasis Al-Andalus, sed la in-  
vado de Sicilio fare de normandoj baris  
lian deziron reveni al sia patrio. Li pasi-  
gis la lastajn jarojn de sia vivo en la  
kortego de Media (duoninsulo ĉe Tuni-  
zio) kaj en Bugio, kie li akiris grandan  
prestigiĝon kiel poeto pri arkitekturarto,  
stilo kiun li regis pli bone ol iu ajn alia  
en Okcidento. Li do estis inda sekvanto  
en Okcidento de la lirika skolo kreita de  
al-Buthuri (m. 897) en Oriento cele al  
priskribo de la arkitekturarta beleco. Jen  
versoj priskribantaj tiujn artajn detalojn,  
vere elegantaj kun klaraj novklasikaj  
nuancoj:

Neniam, eĉ en Grekujo,  
estis alkazar' pli brila,  
nek loĝejo pli komforta,  
nek volboj plej belprodigaj.

Ĉe la malvarmetaj kortoj  
viglas diroj vervfascinaj,  
kaj ĉe la ĝardenoj friskaj  
Eden-ĝojoj ĉie vibras,  
ĉio amuzon propagis,  
la parol' ja sonis dia. (6)

Kun lerteco senkompara Ibn Hamdis priskribas la belecon de la fontanoj, la arton de la plafonoj, la filigranon de pordoj kaj fenestroj, la profilojn de la monumentoj kaj la malfacile esprimeblajn nuancojn de la plurkoloraj juveloj kaj de preciozismoj nereprodukteblaj el la naturo...

Sed reprodukti tiom da poemoj pri ĉiu el la artaj detaloj, kiujn perceptis Ibn Hamdis, preterpasus la normalan spaccon de simpla artikolo kaj perfekte plenis kompletan monografion...

Cetere, mi esperas havi la okazon verki novajn artikolojn en esperantistaj gazetoj pri aliaj arab-siciliaj poetoj. Mia intenco, disvastigante tiujn biografiojn, ne estas malkovri ion... jam malkovritan inter fakuloj pri la temo, sed diskonigi al la ĝenerala publiko la poeziajn valorojn, kiuj tiel alte elstaris en Poezio dum la mezepoko.

Ibn Hamdis vivante en ekzilo rapide maljuniĝis kaj fine restis tute blinda. Venkite de frua maljuneco pro tiom da malfeliĉoj, li forpasis, laŭ kelkaj, en Majoroko; aliaj opinias, ke li forpasis en Bugio en la jaro 1133.

(1) Fatimioj: En Nordafriko tiu dinastio anstataŭis tiun de agladioj en tiu teritorio. Fondis ĝin 'Ubayd Allāh Maĥdi, devenanta de 'Ali kaj de Fatima, el kio devenas la nomoj fatimioj kaj 'ubaidioj.

(2) Teksto Ibn Jallikan; Ibn Hamdis.

(3) Maqqari II, pĝ.416.

(4) Biblioteca Araba-Sicilia, pĝ. 553,

Reprod. A.F. von Schack.

(5) Biblioteca Ar-Sic. pĝ. 566 kaj 567.

(6) Maqqari I, pĝ. 321.

(3) OMAĜE AL  
AMALIA  
NÚÑEZ DUBUS

A.M.B.

De surprizo al surprizo, post la anonco de la reeldono de la verko *Dekdu poetoj en Germanio*, kaj publikigo en *Boletín*, duafoje, de poemoj verkitaj de nia samideanino A.N.D., ni ricevis kelkdekojn da paĝoj de poemoj de nia navara koleginino, senditajn de la prestiĝa poeto William Auld, kiujn li iam ricevis de nia neforgesebla amiko D. Juan Régulo Pérez. Ĉi tiujn poemojn, kua aliaj kolektitaj de D-ro Olavide kaj de mi mem, mi projektas publikigi en nia bulteno iom post iom laŭlonge de la jaro 1996/1997, kiel omaĝon al la navara esperantistino okaze de la 20-jara datreveno de ŝia forpaso.

Ni tutkore dankas al prof. Auld pro lia ĝentila sendaĵo, kiu fakte ebligas al ni diskonigi pli amplekse la verkaron de Amalia Núñez Dubús samtempe omaĝi ŝian figuron, preskaŭ tute nekonatan de la hispana esperantistaro. Tutkora dankon, prof. Auld!

Nun mankas trovi la manuskripton *Hispana Antologio*, verkitan de nia nava kolegino laŭ peto de HEF-sembleo kaj ne eldonita pro financo-manko; ĉu la fortuno faros, ke ni trovu ankaŭ tiun Antologion? Ni ne perdas la esperon!

Niaj vivoj estas fluoj  
fincelantaj al la maro  
kiu estas la mort'.

## RIVERO

Ĝi ne memoras sian subteran kuron;  
sed kun plezur' memoras naskiĝan fonton,  
en la rokejo, kiam la horizonton  
ekvidis ĝi kaj belan ĉiellazuron.

Per kia frenezmarŝ' ĝi rapide kuris  
tra filikoj, kantante la vivan ĝojon,  
per kia forto ŝtonojn kaj trunkojn skuis  
petante de l' Naturo liberan vojon!

Rebrilis ĝiaj ondoj per lum' junia,  
ĝisfunde ĝin sekigis somera varmo  
kaj dum la nokto vintra, kruelgracia  
la frost' katenon metis al ĝia svarmo.

Sed kiam nov-sezono katenon rompis  
kaj liberiĝis vigla la suferanto,  
ridante ĝia fluo denove pompis  
per ŝaŭma kaj libera klarakva kanto.

La dornojn kaj la rozojn akvumis ĝi  
por ĉiuj frato ĉiam, infan' sen kulpo,  
kaj apud bord', ĉe rava flumelodi'  
sin banis gekolomboj kaj trinkis vulpo.

Al ĉiu oferdonis ĝi serenecon,  
amiko de bonuloj kaj malbonuloj.

Maldanke oni jetis en ĝi terpecon;  
neniam malpuriĝis l' akvospeguloj.

Nek tempo, ve, nek akvo senfrukte pasas;  
malkreskas rapideco, brueto vorta,  
ĝi ebenejon venas kaj monton lasas:  
ju ĝi pli larĝa estas, des pli malforta.

Ĝi, hela, klara, profunde bele estas  
kaj, post vojaĝo longa, fiere zumas.  
Nenie fundastonoj videblaj restas,  
nek ĝin haltigas vintro nek varm' konsumas.

Regata de Scienco, kaptita jam  
ĝi movas la ilarojn de la fabrikoj,  
trairas ĝin, facila vojet', la pram'  
surversas ĝi la rozojn kaj la brasikojn.

Iradon sian igas ĝi malrapida,  
ĉar salo jam penetris en la ondar'  
la sal', anonc' de maro, la vivavida,  
de senmezura, nigra, terura mar'.

La mar', el kie iam eliros ĝi  
pro fruktiganta kiso de sunsomero  
denove esti nuboj, vapor', glaci',  
fontano, rivereto, torent', rivero.

Orig. verkita de A.N.D.

LA LERNOLIBRO

# Esperanto

Grupo de Bibliotecoj Internaciaj

Miguel Gutiérrez Adúriz

## MIA PARADIZO

Okazis januare, dum vesperigkvieto.  
En mia ĉambro, sola apud mia forneto,  
en la varmeto milda ŝatata de la kor'  
dum daŭre kaj senhalte faladas la neĝeroj,  
tiu antikva bildo, kvazaŭ nuntempa vero,  
revivas en memor'

Mia bonvola patro, jam iom dubblankhara,  
revenis ĵus al hejmo, post kafo amikara  
kaj priparolas iom la urbnovajojn, dum  
mia patrino bona flankmetas manlaboron  
kaj kun ridet' aŭskultas kun amoplena koro...  
kaj malrapide kreskas la dolĉa noktmallum'

Mi estas dorlotata knabino malaktiva,  
malica kaj, samtempe per paradoks', naiva,  
al kiu la Tri Reĝoj alvenas kun donac';  
sed knaba okulparo fiksiĝis al la mia  
kaj pro la ora dorno de l' venusido dia  
forflugis jam por ĉiam la infandorma pac'

Mi morgaŭ iros nepre muzikakademien,  
fidela servistino min akompanos tien,  
—ne deccas iri sola al juna ctburgin'—  
sed tia mallibero kutima ne min ĝenas...  
ĉiam por huti —jaŭde— kaj babiladi venas  
ĉe mi la amikino ŝatata plej, Julinj'

\*\*\*

\*\*\*

Kiam dum la laboro aŭ la ripoz' mi revas  
pri Paradiz' ĉi tiu malnova scen' sin levas  
antaŭ okuloj miaj per nedirebla mild'  
kaj rememor' pri tago samkiel tag' alia  
de, nur nun komprenata, viv' sankte familia  
al mia mens' aperas kvazaŭ penrita bild'

Kiam mi revas tiel, mi tute ne komprenas  
ĉu mia preĝo pius, ĉu male mi blasfemas:

sed ĉiel min pardonu eterna la Piec'  
ĉar, post la mort' proksima al mi plej estus kara  
la revivado kiel knabino deksesjara  
dum tuta l' Eternec'

Orig. verkita de A. Núñez Dubús

## ATENTU!

Ĉu vi jam pagis vian HEF-kotizon  
por la venonta jaro, 1997?

Nu, helpu nin agi ĉiam pli kaj pli  
efike. Ni volas doni al vi ĉiam pli kaj pli  
da servoj. Faciligu al ni la taskon. Pagu  
vian kotizon kiel eble plej frue.

Vidu la 32an paĝon!

## Deziras korespondi

38-jara finna fraŭlo deziras korespondadi kun 30 ĝis 38-jara virino. Mi serĉas veran amikino aŭ vivkunulino kaj ŝatas sportojn, filatelion, kolekti bildkartojn aŭskulti bonan muzikon kaj studi lingvojn. Mi deziras ricevi respondon kiel eble plej baldaŭ, se eble en Esperanto aŭ en la hispana lingvo.

Mia adreso: Tapani Lappalainen; Kivalakotikylä, FIN-37500 Lempäälä, Finlando.

33-jara esperantisto, laboranta en elektrolampa uzino, interesiĝas korespondadi pri turismo kaj kanoto-sporto krom kulturaj temoj. Gefiloj studas la hispanan lingvon. Adreso: O.R. Feoktistov; TVER-regiono. 171210-Lijoslavl, a/r 9. ROSSIJA. Rusia.

# Jan la kvara!

Al la nunjara 4-a Internacia E-Semajno de la Kulturo kaj Turismo en Calella aliĝis 50 homoj. El la 47 ĉeestantoj, 10 estis eksterlandaj. La etoso de la "Semajno", kies tri pilieroj estis kulturo, turismo kaj distro, estis mirinda.

La 6-an de oktobro okazis la inaŭguro kun ĉeesto de s-ro Joaquim Rey i Llobet, urbestro de Calella, akompanata de la magistratano pri kulturo kaj turismo, s-ro M. Campoy. S-ro J. Rey deziris al ni grandan sukceson en la nobla tasko, kiu estas la lingva interkompreniĝo, problemo, li diris, kiun ni bone konas en ĉi tiu turisma urbo.

El la kultura flanko ni devas reliefigi 4 prelegojn kaj debaton. G. Moya elektis la temon "La homaruniĝo". S-ino Carla de Lorenzi prelegis pri la vivo de Andreo Cseh. La pola s-anino Jeannette Sidorak parolis pri la movado en Polujo, kaj s-ro Luis Serrano prelegis pri la temo "Ni estas ĉirkaŭataj de kadavroj".

Apartan mencion meritas la debato "Ĉu fartas bone Esperanto?", kiun moderigis Milan Sudec. La ĝenerala opinio estis ke nuntempe Esperanto fartas

bone. Kvankam en Eŭropo estas grava stagnado en Afriko, ekzemple, ŝprucas juna movado. Post la fino oni dediĉis minuton da silento al: Juan Fernández, Josep Climent kaj Ada Sirkorska.

Tri ekskursoj okazis. Vizito al Perpignan, kie ni kontaktis niajn francajn gesamideanojn. Vizito al la Botanika Ĝardeno en Blanes, kaj fine vizito al la amuz-parko *Marineland* (vd. la foton). Turisma trajneto promeniĝis nin tra Calella, kaj ni havis la okazon viziti la muzeon *Gallard*. E-kurson laŭ rekta me-



4a Semajno

todo gvidis s-ino Carla de Lorenzi, kaj pastro José M. Claramunt, kune kun la loka paroĥestro, celebris Diservon kaj predikis en Esperanto.

Ĉiutage post la vespermanĝo oni povis spekti video-filmojn pri pasintaj "Semajnoj". Aparte rememoriginda estis la vespero dediĉita al kantado de "habaneras" fare de profesiaj kantistoj. Fine la urba magistrato invitis nin al la festo de la "Biero". Resume: injekto de kuraĝo por iri antaŭen.

# JARABONOJ KAJ KOTIZOJ POR 1997

## Hispana Esperanto-Federacio

Ordinara membro (OM) .....	3.300
Ordinara membro (con tarjeta joven) .....	2.970
Kolektiva membro (KM).....	6.600
Kolektiva membro (dek ekzempleroj).....	16.500
Protektora membro (PM).....	6.600
Emerita membro antaŭa al la jaro 1995 (EM).....	2.650
Abonantoj el eksterlando .....	NLG 53

## Universala Esperanto-Asocio

Membro-abonanto (jarlibro + revuo) .....	5.500
Abono al revuo <i>Esperanto</i> .....	3.500
Abono al <i>Kontakto</i> .....	2.100
Membro kun jarlibro .....	2.200
Membro kun gvidlibro.....	900

**Eventoj** ..... (aere, 6.600) 5.700

Peras: HEF. Rodriguez de San Pedro, 13. 3. 7; ES-28015 Madrid.

**KAE-Infomilo**..... 800

Kasisto: Santiago Torné Grau; C/Roca, 22, 3, 1 ES-08208 Sabadell. Barcelona

**Heroldo de esperanto**..... 3.350

Peras: Luis Serrano Pérez; C/ Font Nova, 32. ES-08202 Sabadell (Barcelona) Tel.

(93) 727 50 21.

**Monato** ..... (aere, 5.840) 5.000

La jaro ..... (aere 1.030) 750

**Literatura Foiro**..... konsultenda

Peras: Juan Azcuénaga, Gral Dávila, 127, portal 7, 2 izq. 39007 Santander. Konto de

Caja Postal n-ro 3548531

## Kajeroj el la Sudo. (Trimonata)

Por SAT-membroj .....

800

Hispanaj abonantoj .....

1.000

Eksterlandaj abonantoj .....

1.200

Kasisto: José M. Bernabeu Franco. C/Gral. Primo de Rivera, 8; 03360 Callosa de Segura (Alicante). Kontonumero 28.09.722.429 de Caja Postal.

**La Kancerkliniko**, kvar numeroj .....

3.200

**Rokgazet'**. Kvar numeroj .....

2.500

Peras: Nicolas Gil Carballo; Apartado 305. ES-24080 Leon.

## KIEL PAGI ABONON

Post enkontigo de la koncerna sumo, sendu ĉiam kopion de la pag-pruvilo kune kun noto klariganta la kialon de via pago, tio estas kion vi volas aboni, al la koncerna peranto. Atentu ke ne agi tiel, povus kaŭzi problemojn.



# Aniĝilo kaj abonilo por 1997

(Foto)kopiu kaj poŝtu aŭ faksu al la HEF-oficejo. Bv. skribi klare.

32

## Personaj datenoj :

Kompleta nomo : ..... Annumero: .....  
Adreso : .....  
Poŝtkodo kaj urbo : .....  
Tel. : ..... Naskiĝdato : ..... Retadreso: .....

## Aniĝo :

- OM ordinara membro ..... 3 300 ESP  
 kun junulkarto ..... 2 970 ESP  
 PM patrona membro ..... 6 600 ESP  
 KM kolektiva membro ..... 6 600 ESP  
 EM (nur por jamaj EM-anoj 1995e) ..... 2 650 ESP

Ĉiu ano ricevas *Boletín*; infanoj ĝis 12 jaroj *Juna Amiko*; junuloj inter 13 kaj 30 jaroj,

*Kontakto kaj Konkize*. PM-anoj ricevas 5-centonan rabaton je mendoj de libroservo kaj je abono al *Eventoj, Esperanto kaj Kontakto*.

## Abonoj :

- Boletín: ..... 3 700 ESP aŭ 50 NLG  
 Eventoj: .....  surface: 5 700 ESP;  aerpoŝte: 6 600 ESP  
 Esperanto: ..... 3 500 ESP  
 Kontakto: ..... 2 100 ESP

## Pagmaniero :

- Bankordone (nur por aniĝo; plenigu la malsupran formularon).  
 Elspezo en konton 14.011.966 de Caja Postal (kunsendu spezilono).  
 Ĉeko por "Federación Española de Esperanto" (aldonu 375 ESP).  
 Elspezo en la konton hefb-m de U.E.A. (kunsendu ĝirilkopion).

Dato :

Subskribo:

## DOMICILIACIÓN BANCARIA

Banco o caja: .....

Dirección: .....

Código postal y localidad: .....

C.C.C.: □□□□ □□□ □ □□□□□□□□

entidad sucursal D.C cuenta

Muy señores míos:

Les ruego atiendan con cargo a la cuenta arriba indicada los recibos que les sean presentados por la Federación Española de Esperanto en concepto de cuota anual, hasta nueva orden.

Fecha:

Nombre y firma del titular:

